# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de Ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Bob Felby**



**PLENUMITA 25/08/2022 Kvincentnaŭdeksepa eldono (unua eldono 20/09/2011)**

## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**
Alternativaj Novaĵoj https://www.greanvillepost.com/ https://titaniclifeboatacademy.org/ http://thesaker.is/

***Uzindaj ligoj*** *Google Translate* *Plena Ilustrita Vortaro* *Freelang Vortaro* *lingvohelpilo* *PMEGramatiko* *esperanta retradio* *Plena Analiza Gramatiko* *Pasintaj AE eldonoj* *Esperanta himno* *duolingo entute* *openclipart.*

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**
Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo
Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

## Entute 690,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **298,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas **158,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas **140,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018
Nun studas **94,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )



## Esperanta Retradio



DONAS BONAN ĈIRKAŬ-5 MINUTAN AŬSKULTADON KAJ LEGADON ĈIUN TAGON. **LA KVIN KAŬZOJ POR PLORI**
20a aŭgusto 2022

Karaj Amikoj NOTU! Numero 600 de AE post kelkaj semajnoj kaj eble 601 precize 11 jarojn post unua de 2011, eble unu semajnon pli poste! Kion povus eksteraŭstraliaj gelegantoj, kiel mi, kontribui? s-ro Ueli HAENNI

# Surhavu vizaĝmaskon.



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.** Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la kronviruso. Vi respondecas pri via sano, do portu maskojn. *Roger Springer*

Kiam oni informas min pri fuŝaj vortoj, frazoj, ktp. kiun mi ricevas dum la unua semajno post la ĝenerala elsendo, ili estas korektitaj antaŭ ol mi sendas kopion al AEA por la arkivoj

http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo *Roger Springer*




La solena inaŭguro: vic-prezidanto de UEA, Fernando Maja, parolas.

## 107A UNIVERSALA KONGRESO EN MONTREALO: MIA SPERTO ĜIS NUN*

Jonathan Cooper

Mi komencis mian vojaĝon al Montrealo sabaton je 05:00, kiam mia filino ŝoforis min al la flughaveno en Comox, Brita Kolumbia. Tamen, post kiam ni alteriĝis ĉe Montrealo iom post 17:00, io okazis, kaj ni devis atendi niajn valizojn dum proksimume unu horo kaj duono! (Estis neniu ekspliko de Air Canada.) Pro tio, mi alvenis al la kongresejo kiam la Movada Foiro finiĝis. Bedaŭrinde, ĉar mi planis prizorgi la tablon por Aŭstralio, kaj disdoni broŝurojn pri la kongreso en Melburno en januaro.

Feliĉe mia kongresa sperto pliboniĝis post tiam. Mi ĉeestis multajn fascinajn prelegojn pri diversaj temoj, kaj partoprenis amuzajn paroligajn lecionojn, kiujn gvidis Sylvain Lelarge (iufoje konita kiel la edzo de Katalin KOVÁTS).

Estis plezuro re-renkonti kelkajn amikojn, kaj renkonti ĉeeste unuafoje Alexander Vaughn Miller, kiu lerte gvidis la kurson por progresantoj dum la ĉi-jara aŭstralia virtuala kongreso.

La plej elstara programero por mi ĝis nun estis duparta koncerto mardo-vespere. Unue, Joëlle Rabu kantis, akompanite sur la piano de sia filo, Nico Rhodes, kaj en la dua duono, Yves Desrosiers kaj kvin aliaj muzikistoj ludis muzikon, ĉefe instrumentan, komponitan de Yves. Ĉio estis tiel altnivela kaj inspiranta. Pli venos…



Sylvain Lelarge (en la ĉapelo) gvidas ekzercon pri falsaj vort-amikaj.




La akceptejo kaj kongresa butiko


Amri Wandel prelegas pri spacteleskopoj


Joëlle Rabu kaj Nico Rhodes


Yves Desrosiers kaj sia muzikistaro

Jonathan Cooper



*Bob Felby*



Se vi ankoraŭ ne havas sufiĉe da legaĵo por la venonta "Aŭstraliaj Esperantistoj", jen eble vi ĝojos publikigi ĉi tiun veran okazintaĵon:

Du knaboj survojis al sia feriejo kaj decidis iri fiŝkapti. Survoje al la fiŝkaptejo ili vidis grandegan paron da ŝuoj en fenestro de porturista vendejo. "Vidu la prezon," diris Davido, ''kvincent dolaroj."

"Ili estas krokodilaj ŝuoj," diris Boris. "Mi scias kie ni povas ricevi multajn el tiuj, kaj tute senpage!"

Boris daŭrigis sian iradon. Ĉar li ne revenis post kelkaj horoj Davido iris serĉi lin. Li trovis krokodilojn flosantajn ventrojn supren en la akvo, sed neniun signon de Davido. Fine, post angulo li trovis lin batalante grandegan krokodilon en iu lago.

"Kion en la mondo vi faras?" Li kriegis.

"Nu," respondis Davido, "se tiu ĉi aĉulo ne surhavas ŝuojn, mi tuj cedas"!